


STRASBURGO, 16an, 17an kaj 18an de oktobro 2009

# La 2a federacia kongreso de Eŭropo Demokratio Esperanto

Ni gastos ĉe la junulargastejo de la « parc du Rhin ». Ĝi troviĝas apud la germana limo, ĉe la franca flanko de la « duriverborda ĝardeno » (Jardin des deux rives / Garten der Zwei Ufer).

## KIEL ALVENI ?




**Kontaktinformoj de la junulargastejo**

Auberge de jeunesse 2 Rives "Vue sur le Rhin"
Rue des Cavaliers
67000 - Strasbourg

(33)(0)3 88 45 54 20

(33)(0)3 88 45 54 21





COMMENT ARRIVER ?

# Trajne el Francio

**De la strasburga ĉefstacidomo estas du ebloj por atingi la lokon:**

**REKTA BUSO**
**Daŭro ĉ. 35 minutoj**

Uzi la buson numero **2** direkte al **Pont du Rhin** ekde la haltejo tuj fronte al la stacidomo. Veturi ĝis la haltejo **Jardin des deux rives**. Dumtage estas busoj ĉiujn 10 minutojn, vespere jen la horaro valida por vendredo:

20h05, 20h23, 20h53, 21h24, 22h23, 23h24


La junulargastejo situas 10 minutojn piede for de la haltejo.

**KOMBINAĴO TRAMO KAJ BUSO**
**Daŭro ĉ. 35 minutoj**

De la interno mem de la stacidomo, malsupreniru en la subteran tramstacion ĉe la kajo direkte al **Aristide Briand (linio verdkolora D)**. Entramiĝu en la koncerna tramo (atentu estas pluraj linioj ĉe la sama rejla vojo). Eltramiĝu ĉe la finstacio **Aristide Briand,** transiru la straton al la plej proksima, fakte apuda bushaltejo**.** Enbusiĝu en la venontan buson **numero 21** direkte al **Kehl-Stadthalle**. Elbusiĝu ĉe la **haltejo Jardin des deux rives**.

Po unu ekveturo ĉiun kvaronhoron. Vojaĝdaŭro foje sufiĉe plilongiĝas ekde la 19a horo.

La junulargastejo situas 10 minutojn piede for de la haltejo.



# Trajne el Germanio




Piediru por transiri la Rejnon ĉu per la Europa Brücke, ĉu rekte per la porpiediranta ponto en la duriverborda parko (ni tie kolektis subskribojn ĉe la germana flanko pasintan fojon). Se piediri, mi konsilas pli uzi la bluan vojon (multe malpli da veturiloj). Se vi volas kiel eble malplej multe piediri, eblas uzi la **buson numero 21** direkte al **Gutenberg** ekde la Kehl stacidomo, sed vi restos nur unu aŭ du haltejojn ene, do eble ne indas foruzi bileton por tiel mallonga vojaĝo. Elbusiĝu ĉe **Jardin des deux rives** kaj iru laŭ tio, kion mi priskribis por la francaj trajnvojaĝantoj.

# Prezoj de publikaj transportrimedoj

Jen la diversaj biletoj aĉeteblaj:

- 10-opa biletaro kontraŭ 12 eŭroj (tio estas po 1,2 eŭro por bileto)
- 1-opa bileto kontraŭ 1,4 eŭroj
- individua 24-horvalida bileto kontraŭ 3,6 eŭroj (tempo kalkulata nur ekde forvalidigo)
- grupa 24-horvalida bileto kontraŭ 5,2 eŭroj (por 2 ĝis 3 homoj) ( tempo kalkulata nur ekde forvalidigo)

24-horvalida bileto ne estos tre interese ekuzi vendredon, tamen jam aĉeti jes ĉar nur aĉeteblas ĉe biletvendiloj (kaj ne en busoj). Por veturi vendredon al la junulargastejo, mi konsilas uzi simple 1-opan bileton. Tamen jam aĉetu 24-horvalidan bileton SEN ĜIN FORVALIDIGI (sans composter, ohne entwerten) por la morgaŭo. Vi povos ĝin forvalidigi sabaton posttagmeze, tiel ĝi validos kaj por la urbumado sabaton (tien kaj reen) kaj la reveno al stacidomo dimanĉon. Se vi organiziĝas en grupo, ankaŭ vi povas aĉeti la grupan 24-validan bileton.

# Aŭte

**Entajpu la adreson de la junulargastejo en via persatelita birsistemo aŭ se ne:**

**Por germanoj:** Veturu ĝis Kehl, transveturu la Rejnon al Strasburgo kaj rigardu maldekstre, vi vidos tendegojn de cirko. Post ili, turnu maldekstren laŭ eta strato kiu nomiĝas « Rue des cavaliers » (vidu la supran foton por pli bone kompreni). Se vi preterveturas preĝejeton maldekstre, vi estos veturintaj tro foren. Por pli bone kompreni la lokosituon, vidu la foton en la parto « Trajne el Germanio ».

**Por francoj:** Veturi de Strasburgo al la direkto de Germanio (Kehl). Kelkajn metrocentojn antaŭ ol transveturi la ponton al Germanio, la strato al la junulargastejo troviĝos dekstre, antaŭ la cirkaj tendegoj kaj post preĝejeto. Por pli bone kompreni la lokosituon, vidu la foton en la parto « Trajne el Francio ».

Por pli da detaloj, elprintu ion el reta vojplanilo.